

LAŬOKAZA NOVAĴLETERO

**Organo de la
Internacia
Komerca kaj Ekonomia
Fakgrupo**

[Provizora sidejo ĉe:]
Hornisgrindestrasse 8,
7580 Bühl 16,
FR Germanio

Numero 19

Marto 1988

Grandsignifa evento en la scienca mondo

SPERTOJ DE LA 2-A INTERNACIA EKONOMIKISTA SIMPOZIO

Grandsignifa evento okazis en decembro en la internacia ekonomikosciencia vivo. Inter la 28-a kaj la 29-a de decembro okazis la 2-a Internacia ekonomikista simpozio en Hungario. La loko de la internacia scienca renkontiĝo estis la nove rekonstruita monumental konstruaĵo de la fama Budapeŝta Ekonomikista Universitato.

La enkondukan prelegon post la inaŭguro faris profesorino Katalin Szabó, estrino de departemento de politika ekonomiko de la gastiganta universitato. La ĉeftemo de la prelego estis tre ĝenerala kaj speciale aktuala en la nuna tempo: „Informatiko kaj ekonomio”. Profesorino Szabó emfazis en sia prelego la gravecon kaj necesecon de la evoluigo de merkato ne nur inter kapitalismaj cirkonstancoj, sed ankaŭ en la socialisma mondo. Post la prelego la partoprenantoj de la simpozio diskutis la prelegon, kaj laŭ la vigla diskutado oni povis konstati, ke la internacia partoprenantaro profunde interesiĝis pri la novaj eventoj de la hungara ekonomia reformprogramo, kiun antaŭ nelonga tempo akceptis la hungara registaro kaj la Parlamentejo.

Post la diskutado la nordamerika Thomas A. Goldman, redaktoro de „Ekonomia Bulteno pri Usono” kaj „Internacia Revuo pri Ekonomio kaj Komerco” prelegis pri gravaj tendencoj de ekonomia vivo. La titolo de lia prelego estis „Fuzioj hieraŭ kaj hodiaŭ”.

Kvankam laŭ la antaŭe akceptita programo de la simpozio post tiu prelego oni planis aŭskulti la prelegon pri financaj problemoj de la evoluantaj landoj de la tria mondo, oni devis ŝanĝi tiun programon. Pro tio, ĉar la prelego de Thomas Goldman pliprofundigis la internacian diskutadon, kaj sekve de tio tute mankis tempo por aliaj aferoj. La eŭropaj fakuloj, kiuj partoprenis la simpozion, nepre volis kapti la eblon por konsultiĝi kun la fama amerika revuoredaktoro, kaj volis aŭdi kiel li opinias pri la mondekonomiaj pro-

blemoj en la usona ĉefurbo, en Washington. Estis interesa sperti, ke kvankam ankaŭ Goldman estis studento de Nobel-premiita profesoro Friedman, tamen li ne taksis la efikecon de monetaraj ekonomiodirektadaj rimedoj tiel, kiel profesoro Friedman.

Post la dua mondmilito la rapideco de ekonomia evoluo en Japanio estis la plej alta en la alte evoluitaj industriaj landoj, pro tio oni nomas tiun fenomenon kiel „ekonomia miraklo”. Pro tio estis interesa la alia prelego, kiu analizis la plej gravajn komponentojn de la japana ekonomia miraklo. La preleganto rezumis en sia prelego la konkludojn de sia studprogramo, kiun li plenumis en la sudjapana Nantan Universitato.

Krom tio menciindas ankaŭ prelego de universitata adjunkto Jozefo Horváth, kiu traktis la temon de la ŝuldoj de la evoluantaj landoj. Estas opinioj en la nuna mondo, ke tiu problemo povos kaŭzi mondekonoman krizon en la estonto, se la internaciaj financaj rondoj ne trovos taŭgan solvon por tio.

Antaŭ la fino de la simpozio d-ro István Gether, ministreja ĉefoficisto, prezidanto de la organiza komitato, informis la partoprenantaron pri salutleteroj kaj telegramoj, en kiuj famaj sciencistoj salutis la simpozion. Inter aliaj en telegramo salutis la renkontiĝon *Franz Josef Braun* la prezidanto de *IKEF*.

La ĉina Academia Sinica ankaŭ en telegramo salutis la simpozion kaj proponis sciencan kunlaboron por la estonta tempo.

Post la fino de la simpozio mi en amika rondo demandis kelkajn partoprenantojn pri iliaj opinioj kaj impresoj en la okazaĵo. La italia Valente Giuseppe diris, ke por li estis granda helpo, ke la simpozio havis nur unu oficialan lingvon, kaj ke ĝi estis Esperanto. Li spertis, ke la diverslandaj partoprenantoj bone komprenis unu la alian, kaj la diskutado estis pli vigla kaj pli internacia, ol en aliaj renkontiĝoj, kie oni uzas naciajn laborlingvojn. Rilate al la programaro de la simpozio li proponis, ke la organiza komitato enmetu pli da internaciaj temoj en la programon de la venontaj simpozioj.

Thomas Goldman, kies prelego ricevis la plej grandan atenton, diris, ke la relative granda nombro de hungaraj ekonomikistoj, kiuj partoprenis la simpozion, tre impresis lin. Li diris, ke la granda nombro de ekonomikistoj, kiuj kapablas prelegi flue en Esperanto, estas frapa konstato.

Laŭ li granda avantaĝo de la simpozio estas la facila kaj flua interŝanĝo de ideoj kaj pensoj, kaj la amika interkompreniĝado trans landlimoj por kolegoj en la ekonomikaj sciencoj. Li aldonis, ke ĝuste tial, pli ampleksa internacia partoprenado estus dezirinda en la estonto. Li kredas, ke la venonta simpozio sendube realigos tion celon.

Pri la programaro li komentas, ke la prelegoj precipe evidentigis la seriozan analizadon de aktualaj kaj fundamentaj demandoj pri la evoluado de la hungara ekonomio, kiu karakterizas la laboron kaj la gravecon de ekonomikistoj. Laŭ li la signifecon kaj la gravecon de la simpozio montras la fakto, ke la internacia lingvo ebligis la plej efikajn interŝanĝojn en la simpozio en kadro internacia.

En la nuna tempo gravaj kaj profundaj ekonomiaj problemoj aperas kaj en la alte evoluitaj okcidentaj landoj, kaj en la socialisma mondo kaj ankaŭ en la tria mondo. Ekzemple en Usono la grandaj deficitaj en la registara buĝeto estas la fonto de pluraj aliaj problemoj, nome, defcito en la internaciaj kontoj, krute falanta kurzo de la dolaro, malrapida kreskado de la MNP kaj ceteraj. En la orienteŭropaj socialismaj landoj oni esploras, kiel eblas atingi plian efikecon en ĉiuj sektoroj (ekzemple per restrukturigo) por plirapigi la kreskadon de la MNP, sen perdo de ekvilibro en la ekonomia sistemo.

Samtempe ankaŭ en la mondekonomio estas gravaj krizofenomenoj. Multaj ekonomikistoj opinias, ke la malegala ekonomia kreskado inter diversaj landoj estas la plej atentinda fenomeno, kaj la fonto de multaj problemoj.

La 2-a internacia ekonomikista simpozio pruvis, ke internacia diskutado de ekonomiaj problemoj povas efike helpi la analizadon kaj la esplorkonon de diversaj ekonomikistoj kaj samtempe helpas ĉiujn partoprenantojn por atingi pli realan kaj ampleksan konkludon. Pro tio nepre necesos organizi similajn internaciajn sciencajn renkontiĝojn ankaŭ en la estonto. Mi opinias, ke la pli granda sukceso de la venontaj simpozioj bezonos pli grandskalan informadon al la tutmonda esperantistaro, kaj kompreneble al ĉiuj fakuloj, en la plej vasta senco — finis siajn konkludojn d-ro Thomas Goldman.

D-ro Gábor Márkus

Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo

La Estraro:

S-ro Franz Josef Braun, Prezidanto kaj Ĝen. Sekretario

S-ro Roland Rotsaert, Financa Konsilanto

D-ro István Gether

S-ro Francois-Xavier Gilbert

S-ro Lawrence Mee

D-ro Marco Picasso

S-ro Scikó Yamasaki

Revizoro por la financa raporto: D-ro Gianfranco Polerani

Centra sidejo (provizora):

Hornisgrindestr. 8

D-7580 Buhl 16 (FR Germanio)

Financa sidejo:

Visspaanstraat 97

B-800 Brugge/Belgio

INTERNACIA KOMERCA KAJ EKONOMIA FAKGRUPO

Pagoj — Perantoj — Kotizo

Ĉiuj landoj

Poŝtĉekkonto belga (Bruselo): n-ro 000-1592629-83 kaj Konto ĉe Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam, Nederlando: „ikef-e” je nomo de: IKEF, p.a. R. Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge

Perantoj

Britio

S-ro P. Foss, Long House Hotel, Pilton, Som., BA4 4BP

Francio

S-ro F.X. Gilbert, Vert Coteau, Longeville-en-Barrois, F-55000 Bar-le-Duc (CCP 1275-89 L Nancy)

FR Germanio

S-ro F.J. Braun, Hornisgrindestr. 8, 7580 Bühl 16
(Volksban Bühl 713104 – BLZ 66291400) Kotizo: 20 markoj

Italio

D-ro M. Picasso, via De Gasperi 7, I-20057 Vedano al Lambro

Jugoslavio

S-ro S. Taleksi, ul. Oslo'br. 12, YU-91000 Skopje

Hungario

S-ro Jozsef Horvath, Budapest (Sekretario de Ekonomikista Grupo de HEA)

Varsányi Irén u. 8. H-1027 Budapest

Togolando (en LN 17 erare ellasita): S-ro Koffi Gbeglo, B.P. 13169 Nyékonakpoé, Lomé

Koreio

S-ro Han Moo-hyup, CPO Kesto 5154, Scoul

ĉe Novzelando (adreso de s-ro Ryley ŝanĝiĝis) S-ro John C. Rapley P.O. Box 70-038,

Ranui Auckland 8, Kotizo: 20 NZ-dolaroj

Kotizo

400 belgaj frankoj 20 nederlandaj guldenoj

INTERKONATIĜO

a) novaj membroj

La membraro senhalte kreskas. Ĉi-foje ni povas plezure bonvenigi kvin novajn membrojn:

65 Paul PEERAERTS

Direktoro GCA, p.a.

Esperanto-Centrum

Frankrijklei 140

B-2000 Antwerpen, Belgio

66 D-ro Giampiero De CENSO

Via Lampugnano 156

I-20151 Milano, Italio

67 Michel BASSO

153 Rue Clémenceau

F-68000 Vintzenheim-Colmar

Francio

68 Kees RUIG

Groesbeekseweg 53

NL-6581 BJ Malden, Nederlando

69 COVALEX S. A.

S-ro André Piérard

„Les Cascades”

CH-3961 Mollens, Svislando

b) Identecŝildo:

68 Inĝ. Kees RUIG

„De Ruigehoek”

Groesbeekseweg 53

NL-6581 BJ Malden, Nederlando

Telefono: (hejme) + 31.80.580320

(ofice) + 31.80.772550

Telefakso: 31.80.782414 at. Ruig

Telekso: 48279 kkg nl at. Ruig

Eks-eksportestro,

nun ĉefkonsilisto pri internacia

komerco kaj industrio de la

Ĉambro de Komerco kaj Industrio,

Poŝtk. 38200, NL-6503 AE Nijmegen

Delegito kaj fakdelegito de UEA

Lingvaj kapabloj: nederlanda, angla,

germana, franca, hispana.

Kapablas doni praktikajn informojn pri:

– ĉiuj aspektoj de internacia komercrafiko kaj marketingo;

– ekonomio kaj komercado en Nederlando;

– nederlandaj firmaoj.

c) Donacoj al nia kaso

S-ro Basso, Vintzenheim, Francio

(IKEF 67) 200 bfr,

S-ro Gilbert, Bar le Duc, Francio

(IKEF 14), 1400 bfr.

Multan dankon al ili.

Memorigo pri kotizpago 1988

La nova jaro jam komenciĝis. Ĉu vi jam pensis pri pago de via kotizo 1988? Bonvolu ne tro longtempe atendigi nian kasiston. Li estas enspezema homo. Favore al IKEF kaj Esperanto!

DECIDOJ DE LA ESTRARO

Regulo pri estrara laboro kaj pri la sistemo fari decidojn (Parto de ankoraŭ kreota regularo)

La estraro de IKEF pritraktas la problemojn prezentitajn pere de „Diskutpaperoj”. Tiuj Diskutpaperoj estas dissendataj de iu estrarano (plej ofte de la Ĝenerala Sekretario) al la aliaj estraranoj. La alskribitaj estraranoj esprimas siajn opiniojn pri la propono al la Ĝenerala Sekretario. Ĉe voĉdonado ili esprimu siajn motivojn en kazo de sindeteno aŭ kontraŭvoĉo.

La Ĝenerala Sekretario kolektas kaj ordigas la ricevitajn opiniojn.

Se ĉiuj estraranoj unuanime konsentas pri la propono (sen sindeteno kaj sen restriktia kondiĉo), tiam la propono tuj estas aprobita.

En kazo se in estrarano neas, sindetenas aŭ jesas kun restriktia kondiĉo, la Ĝenerala Sekretario prezentas per plia Diskutpapero la opiniojn kaj eventuale amendproponon al la aliaj estraranoj kaj postulas respondon aŭ novan opiniesprimon. Pliaj proponoj povas esti faritaj sammaniere per Diskutpaperoj. Fine la propono estas definitive aprobita, se *du trionoj de ĉiuj ofichavantaj estraranoj* jesas sen restriktia kondiĉo.

Aprobita decido estos anoncita en la sekva LAŬOKAZA NOVAĴLETERO sub la rubriko „Decidoj de la estraro”!

(Rimarko de la redaktoro: Ĝis nun validis strikta unuanimeco de ĉiuj estraranoj ĉe ĉiu decido.)

Regulo pri elekto kaj aprobo de perantoj (Parto de ankoraŭ kreota regularo)

- 1 Peranto por IKEF en iu lando — kie ankoraŭ ne estas tia peranto — povas esti proponata de ĉiu IKEF-membro. La kandidato devas esti membro de IKEF.
- 2 La Ĝenerala Sekretario kaj la Financa Konsilanto kontrolas, ĉu la kandidato taŭgas por la posteno (laŭ lingva kapablo, persona konduto, profesio).
- 3 Se tiu ekzamenado rezultigas neniun malbonan konstaton, la Ĝenerala Sekretario informas la aliajn estraranojn pri tio kaj pri la elekto.
- 4 Se dum unu monato post la informo ne alvenas kontraŭdiro de iu estrarano, la nova peranto estas aprobita.
- 5 En kazo, se iu estrarano scias gravajn argumentojn kontraŭ la koncerna persono, li kontraŭdiru al la aprobo per Diskutpapero.
- 6 Tiukaze la estraro pritraktas kaj findiskutas la temon laŭ la kutima regularo pri estraraj decidoj (2/3-plimulto).

Ĝenerala Kunveno 1988 en Roterdamo

La estraro decidis okazigi ĉi-jare denove nian Ĝeneralan Kunvenon en la kadro de Universala Kongreso. Tiu okazos en Roterdamo/Nederlando de la 23a ĝis 30a de julio 1988. Tagon, horon kaj salonon ni ekscias nur surloke en Roterdamo.

IKEF — diversajoj

Nova emblemo en decido

Je nia alvoko pri nova emblemo por IKEF la redaktoro ricevis 12 proponojn. Ili estas nun en diskutado kaj antaŭelektado fare de la estraro. Tiuj tri kiuj plej plaĉas al la estraranoj estos prezentataj al vi por definitiva voĉdonado por la plej taŭga. Dankon pro via ĝisnuna kunlaboro.

„Laŭokaza Novaĵletero” — aŭ io alia?

Apenaŭ vi estas alvokita por fari proponojn por IKEF-emblemo, nova alvoko pri kunlaboro iras al vi. Temas pri la nomo de nia komunikilo. Ĉu „Novaĵletero” ne sonas iom tro simpla por tiu pligrandiganta kaj espereble ankaŭ plibeligonta informilo por niaj membroj.

Dum neoficiala membrokunveno en Varsovio nomoj kiel ekzemple „IKEF-bulteno”, „IKEF-cirkulero”, kaj eĉ „IKEF-eĥo” aŭ „EKO-EKO” (*Ekonomia eĥo*) estis elpensitaj.

Ĉu eble ankaŭ Vi povas pripensi tion kaj streĉi vian cerbon por taŭga, trafa kaj belsona nomo kiel anstataŭo de la „Novaĵletero”?

ALIAJ GRAVAJ INFORMOJ

Schneider-Joyce tekstprilaborilo

Adaptita versio de la Loco-Script programo kun Esperanto-supersignoj estas havebla de:

S-ro Roel Haveman, De Vluchtestr. 1-401, NL 7524 Enschede, Nederlando. Prezo 20 nederlandaj guldenoj al UEA-konto „rgha-j”. Versio por querty-klavaro estas preta; azerty-klavaro estas preparata; por aliaj klavaroj petu informojn.

Liveranto pri ekipaĵo/maŝinaro por pilo-fabriko en PR Ĉinio serĉata

Atingis min letero de juna ĉina inĝeniero laboranta en pilo-fabriko. La estraro de tiu fabriko — kies ĉefinĝeniero estas esperantisto — volas modernigi la produktad-ekipaĵon. Ili serĉas modernan teknikon el evoluinta lando. Se via firmao fabrikas tian ekipaĵon aŭ se vi konas tian firmaon, bonvolu kontakti nian ĉinan amikon.

Krome li planas „Mondan ekspozicion de Pilo”, por kiu li volonte havus specimenojn de piloj el la tuta mondo.

Jen li adreso: S-ro Huayan Jiao, Shashi-a Dianchi Chang, Shashi, Hubei, PR. Ĉinio

IFER '88 en Leipzigo/GDR, 11-13 marto 1988

Ĉiujare dum la Leipziga Printempa Foiro la esperantistaro de GDR okazigas IFER „Internacia Foira Esperantista Renkontiĝo”, kun ĉiam kreskanta ĉeestantaro. Leipzigo estas komerca urbo. Ni, komercistoj, iru tien, kaj tiam kompreneble partoprenu IFER-on. La organizantoj ofertas al „fakgrupoj kaj asocioj ligitaj al UEA”, ke ĉi tiuj povas okazigi kunvenojn en kadro de tiu internacia renkontiĝo.

Estas nun por ni tro malfrue por organizi IKEF-kunvenon tie, sed estas pripensinde por venontaj jaroj. Tamen, se vi vizitos la foiron, tiam nepre ne preterlasu ĉeesti IFER-on. Kontakto: Kulturbund der DDR, Organiza Komitato de „IFER '88”, Käthe-Kollwitz-Strasse 115, Leipzig, DDR 7010. 2a Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto, 10 – 16 aŭgusto 1988 en Beijing/Ĉinio Personoj interesitaj pri partopreno, bonvolu kontakti: Sciencist-Teknikista Esperanto-Asocio sub la ĉina Akademio de Sciencoj, 52 Sanlihe, Beijing, P.R. Ĉinio.

Rüdiger Eichholz en Eŭropo por prezenti Pekotekon

Dum la monatoj septembro kaj oktobro de 1987 S-ro Eichholz, estro de la Terminologia Centro de ISAE vojaĝis tra Eŭropo por prezenti Pekotekon (*Per-Komputora Terminologia Kolekto*) kaj serĉi kunlaborantojn por ĝi, kaj por esplori la eŭropan komputor-merkaton. Interalie estis ideo-interŝanĝoj de TEC (Terminologia Centro de UEA, Orienta Berlino) kaj pluraj individuaj terminar-kompilantoj. La opinio de Eichholz ke oni uzu IBM-kongruajn komputorojn por kompili E-terminarojn estis konfirmita. La vojaĝraporto kun bazaj informoj pri Pekoteko estas havebla ĉe:

Rüdiger Eichholz, Bailieboro, Ontario, Kanado, KOL 1BO

Prezo: 1 usona dolaro aŭ 2 internaciaj respondkuponoj.

ACORN faras grandajn paŝojn – Internaciismo venas al la Komputoro

Antaŭ nelonge ĉe la komputoroj de ACORN (desegnanto de la BBC-mikrokomputoro) oni vere nur povis skribi sen diakritoj, supersignoj, kaj aliaj specialaj signoj. Se oni havis taŭgan presilon kaj taŭgan tekstoprilaborilon oni kutime nur povis enkonduki la okcident-eŭropajn specialajn literojn en dokumentojn por presado. Pro la edukaj kaj profesiaj celoj de la BBC-Mikrokomputora-Serio oni konsciigis pri la bezono de kapablo uzi ĉiajn specialajn literojn dum ĉiaj uzoj de la komputoro. Tio ĉi signifas ke estus eble enkonduki specialajn literojn en tekstoprilaborilajn verkojn, datumbazojn, ... kaj eĉ en programojn, ĉu kiel datumojn, ĉu kiel parton de la programteksto mem. ACORN komencis desegni nur-legeblan memoron (NLM) por ebligi la uzon de tiuj ĉi specialaj literoj uzataj en diversaj eŭropaj landoj. Dum tio, Grahame Leon-Smith, la prezidanto de EKK, diskutis kun ACORN pri tiu ĉi bezono kaj la bezono por Esperanto en la aranĝoj. La Internacia LNM, kiel ĝi nomiĝas, enhavas la latinajn alfabetojn ISO 8859/1 ĝis 8859/4 de *International Standards Organization*. Ĉefe la Internacia LNM celas la komputor-serion Master-Compact, kvankam ĝi ankaŭ estas uzebla ĉe la Master-128. La Master-Compact havas specialan klavon kiu nomiĝas „kodo” (angle „code”). Ekzemple, por Esperanto estas nur necese klavi „kodon” tuj antaŭ ol oni klavas normalan signon kiu havus supersignon. Do por enmeti „ĉ” oni tajpos „< kodo > c”. La ĝusta figuro tuj aperos ĉe la ekrano (kaj presilo). Tio estas pli facila ol la pli kutimaj aranĝoj kie oni klavas unu signon kiu ofte tute ne similas al la dezirata signo. La Internacia NLM estas unika sistemo. Ĝi estas la unua ĝenerala porinternacia sistemo. Aliaj similaj sistemoj limigas la uzon de specialaj literoj je specifaj aplikoj kiel ekzemple tekstoprilaborado aŭ uzado

de datumbazoj. Kiam oni havas la Internacian NLM, oni estas libera uzi la literojn kiel ajn oni deziras!

(Resumo de teksto de Esperantista Komputila Klubo,
200 Nevells Road, Letchwort, Herts. SG6 4TZ, Britio,
farita de Roland Rotsaert)

ESPERANTO FIRMAEN PER INTERLAND...

Kiel anoncote en la pasinta „L. N.”, paĝo 14, estas baldaŭ naskiĝonta la protekto INTERLAND: nova firmaeto kiu proponas Eon role de interna komunikilo al la firmaoj kun plurnacia dimensio (ankaŭ nomataj „multnaciaj”), nun suferantaj pro misefikeco kaj trokosteco de la tradiciaj inter- aŭ en-filiaj lingvoj (t.e. ĉefe la angla). Klare, tiu servo ne kongruas la multnaciajn firmaegojn, sufiĉe riĉajn por havigi al si lingvospertajn internaciajn stabanojn, sed ĝi ŝajnas interesa por la firmaetoj kun freŝa eksterlanda ekspansio kaj stabo precipe sciencista-teknikista (ne tre forta lingve, tial). Pro la optimumigo tiel atingota en la parola komunikilo kaj la malaltega kosto de la E-trejnado, INTERLAND reale logos al si respondeculojn de tiaj firmaoj, decidontajn unufoje por ĉiuj kontrolataj filioj. Post la unuaj (pioniraj) klientoj, atendeblos neĝbula reakcio: pli kaj pli da firmaoj volos profiti la avantaĝon jam profititan far kelkaj, ĉar la psikaj baraĵoj ĉiam malkonstruiĝas post efikecpruvoj de ia ajn varo aŭ servo.

Nepras kromdiri, ke Eo tiel ne konkurencos la anglan (neanstataŭ\igeblan en la egaj kompanioj kaj por teknika skriba dokumentiĝo) nek la komercajn lingvojn (la plej trafa el ili restas tiu de la kliento!). Nia servo tamen direktiĝas unue al neanglalingvaj firmaoj, kie ĝenerale ne reĝas la kredo pri la ĉiopoveco de la angla. Kvankam celanta nun la francajn klientojn nure, INTERLAND tuteŭropiĝos antaŭ unu jaro, tial proponante partoprenon en sian kapitalon al e-istoj el ĉiuj landoj. Danke' al financa partopreno de e-istoj nur francaj kaj al subvencio de la franca Ŝtatsekretario pri Junularo kaj Sporto (20 000 FF), ni atingis la startkapitalon (50 000 FF), kio ebligis la juran kreon de INTERLAND en januaro 1988.

Se nefrancaj legantoj deziras iĝi akciuloj de INTERLAND antaŭ ĝia tuteŭropiĝo, ili rajtas tamen akiri kapitalerojn el ĝi (1 parto kostas 500 FF, t.e. 72 EKU, sed la interna regularo malpermesas posedi pli ol 20 partojn). Ĉiuj interesatoj kontaktu INTERLAND-Don (8 rue de l'Eglise, F-95520 Osny, 33(1)3030 3994); mendeblas la financa-komerca dosiero, je 2 EKU. Krom la honoro esti unu el la fondintoj de la unua entrepreno kiu uzos kaj uzigos Eon ekstermovade, la INTERLAND-akciuloj, evidente, ricevos parton de la ĉiujara profito de INTERLAND, laŭgrade de ilia investo. Cetere, jam antaŭpensigis aliaj ekonomiaj aplikoj de Eo kadre de INTERLAND: aranĝo de vojaĝoj por la ĝenerala publiko de fakuloj renkonte al alilandaj samfakuloj kun gvidado far 2 e-istoj (1 franca kaj 1 loka) kaj laŭokaza gastigo ĉe e-istoj; eble reprovado de la iama „Tradukreta” projekto; kreado de softvaro por ĉia publiko, ludigantaj per Eo; ktp. Ankaŭ viaj ideoj studiĝos por la baldaŭaj ekspansi-vojoj de INTERLAND...

Alexandre ROUSSET, direktoro de INTERLAND.

KOMERCA TERMINOLOGIO

INTERŜANĜI, SED KIEL SEN VORTO?

de d-ro Marco Picasso

Ekzistas komercaj operacioj, kiuj ankoraŭ ne posedas taŭgajn vortojn en nia lingvo. Temas pri „interŝanĝo” ekzemple, vorto ne ekzistanta en PIV.

Kion signifas, fakte, interŝanĝo? Kaj, ĉu tiu ĉi sola vorto sufiĉas en la moderna internacia komercado?

Interŝanĝo, aŭ pli bone „varo-kontraŭ-varo” estas praformo de pago, sed ne nur uzita de niaj praavoj, ne nur uzata de primitivaj popoloj, sed hodiaŭ tre ofta en la internacia komerco. Tiom uzata, ke la komerca terminologio (ĉefe la angla) posedas plurajn vortojn aŭ formojn por esprimi korekte la koncepton laŭ la situacio.

Lasu min iomete diskuti la temon kaj proponi terminologion al la spertuloj de nia fakgrupo.

Interŝanĝo signifas multajn formojn de komercaj operacioj, ĉiuj malsimilaj laŭ la agadmanieroj kaj la ekonomia signifo. Jen la ĉefaj. Pro tio mi ne plu uzus la ĝenerikan vorton interŝanĝo, sed varo-kontraŭ-varo aŭ almenaŭ „varinterŝanĝo”.

SIMPLA INTERŜANĜO (pli taŭgan vorton oni povas eltrovi). En la latina lingvo: *commutatio* aŭ *permutatio* (komutacio, permutacio); angla: „barter”; itala: „barato”; fr. „troc”; ger. „Tausch”; hisp. „trueque” (trueke).

Tiu ĉi estas la plej simpla, tradicia varŝanĝo, sen pago per mono: ŝafo kontraŭ salo, ekzemple. Oni uzas ĝin ankaŭ en la moderna komercado: Usono varŝanĝas (aŭ mi povas diri, prunteprenante la vorton de la franca kaj hispana, „trokas”) kun Ĝamaiko lakto-devenajn varojn per bauksito. La simpla ŝanĝo estas uzata nur por terproduktaĵoj aŭ krudaĵoj, direkte inter du registaroj. La sistemo havas limojn, pre cipe la garantio pri la valideco de la ŝanĝata caro. Kio okazus se unu el la du ricevus varon ne korespondante al la promesita? La „garantia bankkredita letero” ne ĉiam povas funkcii en tiuj kazoj. Alia limo estas la problemo ĝuste taksi la valoron de la krudaĵoj, kies prezoj daŭre varias. Pro tio ekzistas aliaj formoj de interŝanĝo, kun rilata terminologio.

NEREKTA KOMPENSACIO (*Kontraŭaĉeto). Ang.: *Counterpurchase*; It.: *compensazione indiretta*.

Ĝi estas la plej ofta sistemo, kies ŝanĝo estas difinita per du komercaj senpendaj kontraktoj. La plej uzata estas ŝanĝo de maŝinoj je petrolo.

Ĝenerale la interkonsento daŭras de ses monatoj ĝis tri jaroj; la valoro de la aĉetataj varoj estas iom malpli alta ol tiu de la originala eksportado.

REKTA KOMPENSACIO (*Reaĉeto). Ang.: *Buy-back*; It.: *Compensazione diretta*.

Similas al la supra sistemo, sed la produktaĵo reaĉetata strikte kunligiĝas kun la eksportata, kaj ĝenerale temas pri industriaj fabrikoj aŭ maŝinoj.

Ekzemple, itala firmao eksportas konstruante ĝin, fabrikon por frostigi fiŝon en Afrikon kaj en la kontrakto la eksportisto devas garantii la reaĉetadon de parto de la frostigota fiŝo.

La kontrakto daŭras kelkajn jarojn, almenaŭ 5, kaj la reaĉetado povas valori pli ol la fabriko mem. Tiu ĉi estas komerca formo tre konvena al evoluanta lando ĉar la aĉetanto povas pli facile obteni bankajn garantiojn. Restas nur la problemo de la kvalito de la reaĉetata varo, kiu devas garantii la respondon al la regularo higiena de la reaĉetanta lando. La prezo de la reaĉetata varo povas esti malpli alta ol la kuranta prezo.

RENVERSITA INTERŜANĜO (*Reversita troko). Ang.: *reverse counter-trade*; It.: *counter-trade inverso* (!).

Tiu ĉi sistemo konsistas en la vendo de la rajto por eksporti, fare de la importista entrepreno al alia entrepreno, kiu deziras eksporti al tiu lando.

Tio okazas kiam firmao importas de iu lando, sed ne estas interesita eksporti tien: en tiu ĉi kazo, la firmao donas, kontraŭ makleraĵo, la rajton interŝanĝi varon kun firmao, kiu produktas kaj estas interesata eksporti ion al la unua lando, de kiu malfacile obtenus mona repago.

La „vendo” de la rajto devas esti aprobita de la registaro de la koncerna lando.

KVITA(NCA) KONTO. Ang.: *Clearing accounts* It.: ne ekzistas.

Speciala interŝanĝa sistemo kiu pritraktas varon kaj monon laŭ kiu kaj la eksportisto kaj la importisto kalkulas siajn transagadojn (*tractions*), kaj finpagas la diferencon per mono (pere de la respektivaj bankoj) post fiksita tempo.

Ĝenerale la interŝanĝaj operacioj ne estas tiel simplaj kiel la menciitaj: pli ofte ili kunigas plurajn formojn.

Rapide mi donis kelkajn klarigojn pri la „trokaj” komercaj operacioj. Sekvas ke la simpla kaj ĝenerala vorto „interŝanĝo” ne taŭgas kaj ne sufiĉas. Dum la terminologia laboro, oni devus pripensi ĝin.

Anoncoj:

Direktado, dungado, selektado de personaro; konsultado (perkoresponde per grafologaj kaj morfologaj studoj, surloke por kandidatoj sendotaj eksterlanden); prizorgado kaj analizo de psikologiaj intervjuoj.

Por ĉiuj fakoj, ĉiuj profesioj, ĉiuj niveloj, ĉiuj landoj.

Kontaktu: S-ino DYEL, „A.Z. SELECTION”, L'Etoile, 9 Av. C. de Gaulle, F-74200 Thonon les Bains — Tel. 50.266004.

Franca firmao projektis maŝinon por produkti ŝprucaĵojn. La maŝino efike funkcias kaj oni serĉas interesitajn eksterlandajn industriistojn. Pri ekfunkciigo, prizorgado kaj necesa transporto zorgos teamo da specialistoj.

Kontaktu: S-ino DYEL, „A.Z. SELECTION”, L'Etoile, (9, Av. C. de Gaulle, F-74200 Thonon les Bains — Tel. 50.266004.

3a IES '89

Dum la 2a IES la ĉeestantoj proponis, ke EKOESP anoncu la organizadon de la 3a IES. Se estas grupo, kiu entreprenus la aranĝon de la sekva IES, bonvolu anoncu sin! Se neniam grupo entreprenas la taskon, EKOESP entreprenos kaj la sekva simpozio okazus en Budapeŝto fine de 1989. La anoncojn bonvolu sendi al EKOESP kaj al s-ro Franz Josef Braun.

Enhavo

1. Raporto pri la 2a IES.
2. Estraro
3. Pagoj – Perantoj – Kotizo
4. INTERKONATIĜO
 - a) Novaj membroj
 - b) Identecŝildo
 - c) Donaco al nia kasoMemorigo pri kotizpago 1988
5. Decidoj de la estraro
6. IKEF-diversaĵoj
7. Aliaj gravaj informoj
8. Komerca Terminologio
9. Anoncoj
10. Aliĝilo

AL INTERNACIA KOMERCA KAJ EKONOMIA FAKGRUPO (IKEF)

Financa sidejo:
S-ro Roland Rotsaert
Visspaanstraat 97
B 8000 Brugge/Belgio

Aliĝilo

Per tio ĉi mi/ni petas aliĝon al la Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo (IKEF), kiel individua persono (entrepreno) alia instanco. Mi/ni deklaras la intencon subteni la statuton de IKEF kaj finance kontribui al la mastrumado de la fakgrupo.

Nomo, sub kiu la membreco estiĝu:

Plena poŝtadreso:

S-ro/S-ino/F-inoJaro de naskiĝo/fondiĝo

Profesia okupo kaj agadkampo(j)

Maniero de kotizpago

Aliaj rimarkoj

Loko/dato Subskribo